

# Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH  
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

---

## DOKSY

Doksy apud la Lago de Mácha estas nomo de ĉarma urbeto situanta en romantika regiono. Sed por la ĉeĥoslovaka esperantistaro Doksy signifas novan gravan vojon kondukantan al nia fina celo.

Dum la aŭtuna, vintra kaj printempa sezonoj la vivo en niaj klubejoj viglis, ofte eĉ bolis, la samideanoj propagandis, gvidis kursojn, aranĝis vesperojn kun la plej diversaj programoj; sed kiam anonciĝis la somero kaj la hidrargo en termometroj grimpis al nekredeblaj altoj, la pordoj de niaj klubejoj fermiĝis, la samideanoj ekmarŝis aŭ ekveturis al riveretoj aŭ riveroj, arbaretoj aŭ arbaroj kuŝantaj ĉe la piedoj de montetoj aŭ montoj, ĉiu laŭ sia emo kaj inklinio, . . . kaj nia movado kiel la fabela Rozrozeto ekdormis dormon profundan. Tiel estis kaj ŝajnis, ke tiel ankaŭ ĉiam estos, ĉar la kondiĉo de tiu ĉi alternado kuŝis ja en la naturo mem.

Kaj jen. Venis iniciatemaj samideanoj, kiuj proponis al la libertemponta publiko ĉion, kion ĝi serĉis; ripozon en la ombro de arbaroj, ĉe l' bordo aŭ en la malvarmetaj ondoj de lago, ekskursojn al historiaj romantikaj kasteloj kaj aldone la eblecon en amuza maniero ellerni aŭ perfektigi en la Lingvo Internacia. Ideo simpla kiel ĉiu granda ideo. Kaj ili sukcesis. Cent okdek lernemaj, spirite junaj homoj en aĝo de 8 - 84 jaroj plenigas nunjare ĉiun antaŭtagmezon la klasojn de la loka lernejo, en kiu ĝojige pulsas la vivo Esperanta.

Viglan, gajan, utilan Esperantan vivon eĉ dum somero, jes, tion signifas por ni ĉeĥoslovakoj la Somera Esperanto-Kolegio en Doksy.

Ĉu ne imitinda ekzemplo ankaŭ pur aliaj landoj?

Th. Kilian.

## AVERTO KAJ KONSOLO

Se viajn horojn vi dediĉos  
al versokre' kaj poezio  
vi luksajn aŭtojn nur admiros,  
sed mem sur truaj plandoj iros  
sen groŝ' en poŝ', kun iluzio,  
ke post la mort' vi eble riĉos.

Jiří Kořínek

## Noto de redaktoro:

Estas interese konstati, kun kia senpacienco estas atendata "Verda Voĉo". Oni ne scias, kial la tempo ial tre rapide pasas kaj mankas. Mi memoras, ke en la unuaj jaroj de nia Somera Kolegio de Esperanto ni eldonadis "Verdan Voĉon" ĉiutage. Tiam je la 10a horo oni jam kolportis VV en lernejo. Kiom da ŝercoj kaj klaĉoj estis tie.

En pasintaj jaroj estis eldonitaj nur kelkaj numeroj. Kaj eĉ tiuj kelkaj numeroj estis utilaj. Ili ja estas kroniko de SKE, faris sufiĉe ampleksan laboron por nia E-movado en Ĉeĥoslovakio. Hodiaŭ aperas la unua nunjara numero de "VV". Ĝi denove estu via amiko kaj rememoraĵo pri doksado kaj Doksy.

Antonín Slanina

## KRONIKO

La dekonuan fojon ekvivis dimanĉe la 14-an de julio la ĉelaga urbeto Doksy per esperantista vivo. Preskaŭ 180 lernemuloj kunvenis por la Somera Kolegio de Esperanto. En la stacidomo akceptadis samideanoj Pytloun kaj Špŭr kun siaj helpantoj la alvenatojn el ĉiuj anguloj de la Respubliko por ilin laŭeble kontentige loĝigi. Radias la vizaĝoj ĝojaj pro atendemo de du semajnoj da interesa instruado kaj amuzoj de societa vivo kaj amika kunestado.

Vespere je la 20,30 h plenigis la kursanoj la salonon de la loka Domo de Kulturo por la malferma kaj informa kunsido. Ĉe la prezida tablo eksidis la reprezentantino de la ministerio de instruado k-dino Jiřina Mansfeldová, kiu venis samtempe eklerni en A-kurso nian lingvon. Ĉeestas la direktoro de la Distrikta Domo de Kulturo k-do Karel Lehký kaj la prezidanto de Domo de Kulturo kaj ties Esperanto - rondeto en Doksy s-ano Zdeněk Šaar, kiuj per sinceraj vortoj salutis la inaŭguratan 11an SKED. La Prezidanto de la TKKF s-ano Vítek en sia alparolo akcentas la signifon kaj taskojn de la Kolegio kaj prezentas la instruistan kolektivon. La direktoro de la Kolegio, s-ano D-ro Aug. Pitlík skizas la sukcesajn rezultojn de la pasintaj jaroj de tiu jam famiĝinta kursaro kaj la planojn por la estonteco, kiuj estas promesaj.

Sinsekve alparolas mallonge la kolegianojn la lektoroj Dolfa Bartošík, prof. Th. Kilian, Jiří Kořínek, D-ro Pravoslav Sádlo, Eva Seemannová, Antonín Slanina, Václav Špŭr, Josef Vítek kaj la intendanto de la lernejo Frant. Pytloun. Ĉe fino donas s-ano Špŭr administrajn informojn.

Lunde ekfunkciis per vigla studado la klasoj A-1, A-2, B-1, B-2 kaj C. La instruado daŭras de la 7,30 ĝis 11,15 horo. Antaŭ la instrukomenco kaj en la paŭzoj svarmas la lernantoj en la teretaĝa lakto- kaj bakaĵvendejo de s-ano Pytloun, kiu vendas sur sia stando ankaŭ ĉiuspecajn esperantaĵojn kaj lernilojn. Oni renkontas ĉi tie vizaĝojn konatajn de tiuj, kiuj revenas jam plurajn fojojn al sia ŝategata Kolegio en Doksy. Sed plejparto estas lernantoj novaj, novicoj el la A klasoj. Ĝojige estas, ke supernombras homoj junaj. Plej juna kolegiano estas sepjara, plej maljuna estas la multjara senlaca pioniro, s-ano Kremer el nia plej orienta metropolo Košice; la ĉiam vigla ridetema 84-jara blankharulo estis kortuŝe bonvenigita per florbukedo jam en la malferma kunsido.

La lunda posttagmezo lasis nelongan tempon al la banamantoj kaj poste pluvo dispelis nin el la strando. Vespere en la ĉambrego de la Domo de Kulturo la estro de la amuza fako, s-ano Slanina invitis la talentulojn el inter la kolegianoj kontribui al programo de tiu ĉi amika vespero kaj la sekvontaj. Lia vortpreta sprito persvadis al la sceneja podio samideanon Niko Čekal, kiu kantigis nin al sia harmoniko. Tri spritajn kantojn prezentis kun sia harmoniko knabo Josef Tomašík, kiu rikoltis merititan aplaudon.

Pri siaj interesaj travivaĵoj en Polujo parolis humore Dro Pravoslav Sádlo. Knabineto Zdenka Herbrychová prezentis kanton kaj poemeton. Dum la bunta improvizita programo manifestiĝis deziro de la kolegianoj ekvidi prezenton de teatraĵo „Nora” fare de la ĉeestantaj membroj de la kolektivo de Verda Ĉaro do Julio Baghy. La ĉefrolantino Eva Seemannová tamen rifuzis pro neprepariteco de tia prezentado kaj aliaj cirkonstancoj.

Marde la 17-an posttagmeze okazis la tradicia ekskurso al Bezděz. Piede, trajne kaj aŭtobuse atakis la verdstela armeo la historian burg-ruinon. La dum sia foresto nomumita gvidanto de piedira ekspedicio s-ano Slanina venĝis al la iniciatinto s-ano Vítek per tio, ke li igis lin solon de samba en la hejmeca gastejo sub la kastelo, kie en gaja dancamuzo ekflamis kelkia koro. La parulŝanĝa mazurko kaj kisrekompensa tuket-danco plej varie distribuis la gekolegianojn. La hejmerestinta kronikisto volas ĉi tie prisilenti kelkajn al li raportitajn diskretaĵojn, kiujn li ne povas verifi. Post la noktomezo disportis la aŭtobusoj la ĝojan amikaron al iliaj litoj.

Merkrede arigis la duone suna, duone venta posttagmezo plurajn baniĝemulojn ĉe la strando. Agrabla surprizo estis, kiam el aŭtobuso el Písek, elvenis du jugoslavaj junaj gesamideanoj: Olivera Vulković kaj Mila Radošević el Beogrado, kiuj venis el la Somera

Esperanto Tendaro en Ŝumava. Ni ekbabilis amike kun la simpatiaj gejunuloj kaj ĝuaŭdis ilian fluan kaj bonan Esperanton kaj la post nur 4 monata lernado relative bonan lingvoscion de la Beograda samideanino.

Vespere en la salono de la Domo de Kulturo allogis intereson de ĉiuj ĉeestantoj la elokventa jugoslava samideano Mile Radošević, kiu priskribis al ni siajn travivaĵojn el sia kurta restado en nia lando kaj en aliaj landoj kaj eldiris sincerajn eĉ se flatajn vortojn al adreso de nia popolo kaj niaj samideanoj. Ĉarme alparolis la kursanojn Olivera Vulković kaj igis nin miri pri ŝia rapida ekregado de Esperanto. Interpretis trafvorte Dro Pravoslav Sádlo, kiu ankaŭ flustre tradukis al la jugoslavo la postan prelegon. Sekvis la prelego de prof. Theodor Kilian pri lia esperantistigo en Siberio kaj pluaj liaj spertoj per Esperanto en diversaj landoj. La jam konata prelega kaj rakontista talento de la parolanto absorbis ĉiujn ĝis la lasta momento. Li sciis ne nur interesege rakonti, sed same sprite kaj humore kaj gradigi la vortojn en emociaj momentoj de lia unua ĉeesto ĉe Universala Esperanto-Kongreso kaj en kulmina kaj edifa fino de la bela prelego alvoki la novajn adeptojn de Lingvo Internacia al senlaca pachtalo kaj fideleco.

Jiří Kořínek

### **Rozvrstvení frekventantů koleje podle povolání:**

dělníci, řemeslníci, učni	39,	žáci a studenti	29
techn. zaměstnanci podniků	27,	úředníci n. p. a závodů	22
učitelé, osv. pracovníci	20,	lékaři, farmaceuti, zdrav. pers.	9
ženy z domácnosti	6,	důchodci	4

Celkem 156 frekventantů (26 slovenské nár. ) ze 79 míst Československa.

### **POZDRAVUJÍ VÁS:**

- 1) dopisem i telegramem leningradští esperantisté,
- 2) Somera Esperantista Tendaro en Popelná-krásným, srdečným dopisem posílá pozdravy 100 frekventantů, 4 samideánů z Jugoslávie a 1 švédského samideána, 10 lektorů. Připojili milou fotografii tábora. I my jsme jim v dopise popřáli úspěch a hezké počasí,
- 3) Somera Junulara Tendaro Slovaka en Štrba-lístočkem a celou řadou podpisů,
- 4) Richard Wenzel, víceletý frekventant Koleje, nyní v Euskirchen v NSR, který vyjadřuje naději, že se s námi shledá 1958. Rádi ho uvítáme!,
- 5) Ing. Berthold Guttnann (Běhánky-Teplice Lázně) ankaŭ nia bona konatulo, kiu same deziras alsendon de "VV",
- 6) Geedzoj Kašperovi el Brno, kiuj atendas "feliĉon" en sia familio kaj promesas veni venontjare. Ni kore antaŭgratulas!

### **NOVAĴOJ, SCIIGOJ, RAPORTOJ, RIDO SANIGAS**

Estinata Kolegio, karaj gesanideanoj! Mi alvenis el la suda parto de nia kara respubliko por alporti al vi ĉiuj koran saluton de la tieaj esperantistoj. Ĵus finis ĉe ni la rikolto, kiu en tiu regiono kutimas esti la plej riĉa. Mi deziras al nia kara Kolegio saman riĉan rikolton. La grenoj for- kaj disportitaj de tie ĉi en ĉiun parton de la respubliko maturigu novan grenaron. Plimultiĝu, disvastiĝu nia anaro por krei pacon kaj komprenon inter la homaro. Vivu la paco kaj la kulturo, la du kolonoj de nia movado! Vivu nia popoldemokratia respubliko! Vivu kaj venku nia kara Esperanto!

En la nomo de landlimaj hungaraj samideanoj  
Ernesto G e l e t a .

La 23-an de julio festas sian 50-jariĝon s-ano Antoni Seemann, reĝisoro Verda Ĉaro. Ĉiokaze li

akceptu nian plej sinceran gratulon!

VERDA VENDEJO. Somera Kolegio prizorgis por siaj frekventantoj multan legaĵon. Legi signifas pliriĉigi sian scion, ĉar per la legado ni akiras la frukton de la sperto aŭ pensado de aliaj. Ĉio, kio plifaciligas tiun akiron estas bonvena. Ni devas lerni legi pli rapide, proksimume 400 vortojn po minuto. Ĉe dir-legado la leganto formulas ĉiun vorton al si (proks. 200 vortojn/min.) kaj tio bremsas la legadon. Ekz., se oni montras la filmon sur ekrano kaj ni legas malrapide, la sekvaj frazoj videbliĝas kaj la antaŭaj malaperas, oni vane povas reiri al la antaŭa frazo. Ĉi tie vi vidas, ke estas necese forigi la dir-legadon. Niaj esp. verkistoj elverŝas ĉiam pli kaj pli da legaĵo kaj estas necese, ke restu al ni minimumo por la nacilingva legaĵo. La Verda vendejo prezentas al vi nunjare krom detalaj bezonaĵoj, belegajn esperantajn verkojn. Ne preterlasu la okazon aĉeti bonkvalitan libron!

F. Pytloun.

Kun granda bedaŭro ni sciigis, ke el la besta menaĝerio de s-ano Slanina neatendite perdiĝis (aŭ forkuris?) la plej bela, bone nutrata besto, la azeno. Ĉar ĝi estis pruntita al li por la publika prezentigo en klaso A-1 ni nun ne scias, ĉu la kompatinda besto, kvankam tre inteligenta, malesperiĝis pro tiu alilokigo aŭ formanĝinte la ĉokoladon, malaperis en ventro de la tigo. Se nia supozo estas falsa kaj la besto senespere vagas ie en Doksy, ni petas tiun, kiu ĝin hazarde renkontos, resendi ĝin al ĝia posedinto s. Bartošík, kiu nun priploras sian 25-jaran amikon dum la vojaĝoj tra multaj landoj. Rekompence li promesas donaci al la honesta trovinto la felon de la azeno, kiam ĝi foje vere mortos. Aŭ li povos sur ĝi promeniri tra Doksy.

Letní kolej š m e l i n a ř í ? Naši veřejnosti je známo, že LKED přechovává již po několik let, ba od založení, S l a n i n u, a jak se právě dozvídáme, letos i Sádlo. Žádáme úřady v Doksech, aby přezkoumaly, nejde-li o nadměrné zásoby tuku, a v daném případě upřesnily přiděly všem členům Koleje!

- Do You speak english?
- Kion vi diras?
- Do You speak english?
- Mi ne komprenas vin!
- Mi demandas, ĉu vi parolas angle?
- Ho, jes, mi parolas tre bone kaj vi?

Příspěvky do "VV" odevzdejte redaktorovi Slaninovi!

Hledáte adresy nových korespondentů v cizině? Najdete je v posledním čísle BULTENa pražského klubu, který vám na požádání zapůjčí sam. Pytloun.

VERDA VOĈO - informační oběžník Letní Koleje Esperanta v Doksech vychází podle potřeby. Řídí a za obsah odpovídá Antonín Slanina. Náklad 200 ks.

# Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH  
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

---

1957-02

## NUNJARA NOVAĴO EN DOKSY.

La direkcio de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy enkondukis ĉi-jare novaĵon, kiu celas ekipi ĉiujn frekventantojn de la kolegio per fundamentaj scioj pri esperantismo, historio de la movado kaj esper. literaturo. Ĉiutage kolektiĝis en la salonego de la Domo de Kulturo frekventantoj de ĉiuj klasoj, do ankaŭ la komencantoj, por la kvara komuna leciono, kiu estis prelegata en ĉeĥa lingvo.

Direktoro de la Kolegio Dro Aug. Pitlík prelegis pri jenaj temoj:

Historio de la ideo pri Universala lingvo. Jan Amos Komenský, iniciatinto kaj proponinto de du artefaritaj internaciaj lingvoj. Letero de Dro Zamenhof al rusa esperantisto Borovko (1895). Letero de Dro Zamenhof al la prezidinto de LKK en Bulonjo sur Maro, Dro Alfred Michaux (1905). Artikolo pri Dro Zamenhof, publikigita de lia frato Leono en la gazeto Universo (1910). Programo por la evoluo de Esperanto kaj ĝia movado esprimita en liaj originalaj poemoj.

En la sepa kaj oka lecionoj parolis inice la prezidanto de TKKE Josef Vítek pri la stato de esperantista movado a) en la mondo; b) en Ĉeĥoslovakio.

En la naŭa leciono donis koncizan supervidon de Esperanta literaturo Jiří Kořínek. Václav Špŭr parolis al temo "Defendo de Esperanto" uzante plej novajn kaj trafajn argumentojn el dokumentaro pri Esperanto de Dro I. Lapenna. Antonín Slanina prelegis pri "Rimedo de poresperanta propagando".

La salutinda novaĵo ebligis al ĉiuj kolegianoj ekscii multon pri Esperanta movado, historio kaj literaturo, do parton el tio, kion antaŭe oni studis en la Seminaria D-klaso. En la praktika esperantista vivo ili povos la akiritajn sciojn bone utiligi.

– Jiří Kořínek.

## Karolo Píĉ : ĈE - METODO .

Kio gi estas, scias vi ja!  
Jam en la dua aŭ la tria

laŭĉemetoda leciono,  
vi certe lernis, ke bontono

hispana estas simple bela:  
se io (eĉ se bagatela)

plaĉas al iu senmezure,  
oni donacas ĝin plezure.

Vi plaĉas al mi, Henrieta!  
Lau la hispana etiketa

moro vi devus do vin doni  
kaj igi min pri vi disponi. . .

Kiel vi, kara, pridecidos?  
Decidu . . . Kaj mi nun ekvidos

kiom kaj kion vi klopode  
vere ellernis ĉemetode!

### **Noto de la redaktoro:**

#### AL TIUJ, KIUJ KOMENCIS LERNI ESPERANTON.

Kiu volas vivi, devas "marŝi" . Ne ekzistas haltoj, ĉar ĝi signifus morton. Kiu volas progresi, devas lerni, devas ekzerci, kiu ne lernas, ne nur haltas, sed "paŝas malantaŭen" t.e. malprogresas.

Vi lernis Esperanton! Vi volas fariĝi bonaj Esperantistoj; ne nur bonaj, sed elokventaj. Ne forgesu: Vi devas lerni, vi devas studi! Nur tiel vi iros antaŭen!

Eble vi laciĝos, sed tio vin ne timigu. Eble vi diros al vi: "Kian utilon ĝi donos al mi?" Ankaŭ tia demando ne veke dubon en vi. Neniam diru: "Morgaŭ mi lernos"(ĉar "morgaŭ" signifas "neniam"), sed persiste laboru jam hodiaŭ. Kaj se vi eltenos, vi certe kolektos fruktojn de via penado. Neniam forlasu tion, kion vi komencis lerni.

Esperanto venke marŝas tra la mondo. Esperanto vin baldaŭ bezonos, jes, ĝi bezonos vian helpon, vian oferemon. Kaj tiam, kiam ĝi atingos sian celon, vi kun meritita fiero diros al vi: "Ankaŭ mi helpis al nobla ideo, ankaŭ mi estas unu el la ŝtupoj, sur kiuj esperanto paŝis al sia venko". Kaj vi estos feliĉaj.

Kaj kion postulas viaj lektoroj , kiuj vin instruis en Somera Kolegio de Esperanto en Doksy:

- 1e. Legu ĉiutage almenaŭ kelkajn minutojn. Legu l a ŭ t e kun b o n a akcento!
- 2e. Eluzu ĉiun okazon paroli Esperanton forte, kuraĝe kaj elegante!
- 3e. Organizu vin en lokaj rondetoj ĉe klerigaj asocioj aŭ uzinklubo, se eble ankaŭ en internacia organizaĵo UEA. Abonu gazetojn, aĉetu librojn;
- 4e. Korespondu, tiel vi malfermas al vi la mondon. Ŝlosilon vi havas, ĝi estas ja Esperanto!
- 5e. Estu bona patrujano. Nur tiu, kiu amas kaj estimas sian patrujon, estas bona esperantisto.
- 6e. Ne forgesu nian Someran Kolegion de Esperanto en Doksy, estu fieraj, ke vi partoprenis ĝiajn kursojn.
- 7e. Portu ĉiam verdan stelon! Propagandu, sed ne ĝenu!

Antonín Slanina.

### **KRONIKO .**

Ĵaŭde la 18-an de julio oni ĝuis sunan posttagmezon ĉe la lago. Vespero estis libera kaj la kolegianoj povis ripozi aŭ uzi laŭplaĉe la vesperon por promeno kaj interbabilo. Kelkaj dancemuloj pasigis agrablan vesperon en danckafejo Sparta.

Vendrede 19.7. ekfunkciis sub gvidado de Ant. Slanina nia ĉelaga diskutejo en la posttagmezaj horoj. La oratoremaj samideanoj povis ĉi tie en viglaj kaj interesaj diskutoj montri sian kapablon kaj rezoni pri temo "Kio estas feliĉo". Vespere distris nin la anoj de la estrada kolektivo de la Distrikta Domo de Kulturo en Doksy kaj en programo daŭranta ĝis malfrua horo alternis programeroj muzikaj kun gajaj scenoj, parodiaĵoj kaj recitadoj.

Sabate oni sciigis, ke la projektita dimanĉa ekskurso al Prachovské skály ne povos okazi, ĉar la bezonatajn 4 aŭtobusojn la ŝtata aŭtobusa entrepreno al ni ne povos disponigi. Pro la pluva vetero ne anonciĝis sufiĉa nombro por la vagonara ekskurso al Liberec kaj Ještěd.

Tial dimanĉe matene startis memdecide per trajno nur 17 kolegianoj al Liberec, dum la ceteraj ĝuis la relative belan tagon sur la strando. La sabata kaj dimanĉa vesperoj restis por ĉies laŭplaĉa amuziĝo.

Lunde ree griziĝis la ĉielo kaj ne avaris je pluvduŝoj. Posttagmeze pludaŭris en Domo de Kulturo la oratora kurso pri temoj amo kaj paco. La vespero estis rezervita por retrospektivaj filmoj. Ni vidis filmon el vivo de Dro Zamenhof, el historio de SKED kaj filmojn instruan kaj groteskajn. Projekciis kaj komentariis Ant. Slanina.

Marde la 23-an pro pluva vetero okazis tuttaga instruado. Kompense estos vendrede libera tago. Vespere en la Domo de Kulturo estis improvizita bunta programo, dum kiu muzikis Niko Ĉekal kaj Josef Tomáščík, kiu ankaŭ rakontis ŝercrakonton en valaĥa dialekto. La infanoj de la kolegianoj sindone vartataj de s-anino L. Rejthárková kantis de ŝi lernigitajn kantojn en Esperanto. En profesie perfekte prezentita skeĉo ni admiris arton de Eva Seemannová kaj Antoni Seemann, kiuj rikoltis multan aplaŭdon. Per humoraj programeroj kontribuis s-anino Baša Motyčková kaj s-ano Oldřich Kundera. Por sia ideriĉa kaj neimitebla rakontado gajigis ĉiujn lektoro Josef Vítek.

Merkredo posttagmezo la marŝemuloj faris rondpromenon ĉirkaŭ la lago de Doksy ĝis Břehyně, Staré Splavy. Vespere ni kunvenis en Domo de Kulturo, ĉar la bivaka fajro ne povis okazi pro la postpluva malsekeco. Ni vidis retrospektivajn filmojn de s-ano Slanina kaj al distro kontribuis s-ano Draň. Kočvara, ĵus alveninta el SET en Popelná, s-anoj Kundera kaj Tomáščík.

Ĵaŭde 25.7. okazis antaŭtagmeze la skribaj ekzamenoj en la klasoj de la Kolegio. Oni multe cerbumis kaj paŭtis super la paperfolioj. Je la 14-a horo estis buŝaj ekzamenoj de tiuj, kiuj aliĝis al la ekzamenoj en klasoj B kaj C. En klaso C faris la ekzamonon "eminente kun laudo" 3 kursanoj: la 84-jara Alojz D. Kremer, Karel Štěpánek kaj František Tichý. Plue, 10 frekventintoj de tiu kurso ricevis noton "eminente" kaj 3 "kun sukceso". En B klasoj trapasis la ekzamonon 5 submetiĝintoj eminente kaj 7 kun sukceso.

La ĵaŭda artvespero, kunmetita de Ant. Slanina, fariĝis unuaranga artisma evento, en kiu kulminis la kultura agado de la Kolegio. Ĝi estis inaŭgurita la sekvantan tagon okazonta 70-a datreveno de ekesto de Esperanto.

Enkonduke recitis s-anino Jungwirthová belan poemon "Doksy" de Karolo Píč kaj Dáša Motyčková pianludis komponaĵon de Beethoven "Al Eliza en memorlibron." S-ano Miloš Kala en perfekta dono violonis la Romancon de Wienavski kaj Humoreskon de Dvořák; pianakompanis suverene s-anino Blanka Šaarová. Sekvis la fascine perfekta kaj absorba deklamo de Eva Seemannová, kiu prezentante la 76-strofan poemon "Doktor Zamenhof" de Jiří Kořínek, konfirmis denove sian famon de l' majstrino de deklamata vorto. Ĉiun version de la ĉeĥlingva poemo verkita por ĉi-jaraj du datrevenoj ŝi sciis doni kun plena interna trasentiteco, kiu elvokis profundan emocion ĉe la aŭskultantoj.

Profesorino de konservatorio Vlasta Linhartová per sonora, tenera kaj kulturita voĉo kantis al ni Lulkanton el Jakobeno de Dvořák kaj la Kartan arion kaj Habaneron el Carmen de Bizet kaj rikoltis per sia altranga arto multan aplaŭdon, samkiel la eninenta pianakompano de a-anino Blanka Šaarová. E. Seemannová ravis nin per deklamado de Letero de Tatjana el Eŭgeno Onjegin de Puŝkin en majstra traduko de K. Kalocsay.

Ĝuego superba estis la sekvintaj violonĉelaj programeroj, kiujn al ni prezentis s-ano Dro Pravoslav Sádlo-Páv. Sonáto G-maĵora de Jean Baptisto Bréval igis nin admiri la koncertan majstrodonon de nia fama violonĉelisto. Sekvis Menueto de Fr. Xaver Dušek, "Folieto forblovita" de Leoš Janáček kaj la viglega "Mateník" de Jar. Zich. Kun suverena virtuozece estis arĉita la pretenda kaj belega Koncerto D-maĵora de Josef Haydn. Spirhaltige fluis la korpenetraj tonoj el la kantanta instrumento, kies kordojn la virtuoza mano de la majstro devigis eldoni la maksimumon da belo. La pianakompana arto de s-anino Blanka Šaarová estis same elstara kaj kontribuis al la brila sukceso de tiu ĉi koncerto.

Per kortuŝaj vortoj de la prezidanto de TKKE s-ano Josef Vítek, kiu rememorigis, ke en

ĉi tiuj tagoj sur la tuta terglobo, laŭ iniciato de Unesko kaj UEA, oni solenas la estiĝon de la Lingvo Internacia kaj ĝian noblan aŭtoron, finiĝis tiu ĉi artisme altnivela kaj vere edifa vespero.

Vendrede 26. 7. okazis vespere la tradicia Somera Karnavalo en salonego de Zátíší. Lastfoje ekfontis sincera gajo en la amika rondo de la koleianoj. Svarmis belaj maskoj, jubilis la muzikiloj kaj kelkiu koro ekbatis pli rapide. Laste ni kunestas ĉi-somere en nia Verda urbeto ĉe la fabela lago, kiu nunjare estis de la ĉielaj veterinstancoj tiom malfavorata.

Sabate matene estas lastaj du instruhoroj. Estas disdonataj la atestiloj kaj per kortuŝaj vortoj adiaŭas la instruistoj de sia diligenta lernantaro. Emociaj momentoj, varmaj manpremoj, eĉ kun larmetoj kaj konvinkaj "Ĝis revido venontjare en Doksy".

Jiří Kořínek.

## KRYSAŘ

(Scéna z letošního karnevalu LKED)

Pověstný krysař z Hamelnu <sup>x)</sup>

vylákal krysy kdys z města.

Píšťalka vábně pískala:

Trala-la, trala-la, trala.

Zmačkaný šišák na hlavě,

záplaty, vandrovní ranec.

Šála mu nedbale vlála,

trala-la, trala-la, trala.

Krysař nás vyved' píšťalkou

"páry" ven do temnot lesa.

Srdéčka jejich zplesala:

Tr ala-la, trala-la, trala.

Pi.

*x) Hameln, městečko v Německu. Krysař, za slíbenou odměnu osvobodil svou stříbrnou píšťalkou město od záplavy krys, jichž dlouhý průvod zavedl do řeky Vesery, kde se utopily.*

ATENTU I VI POVAS AŬSKULTI KONCERON DE Dro P. SÁDLO-PÁV ANKAŬ EN VIA URBO.  
ESTAS NUR NECESE PROPONI AL LA ARANĜANTOJ DE LOKAJ KULTURAJ PROGRAMOJ  
(Osvětová beseda, Okresní dům osvěty ktp.) ARANĜI LIAN KONCERTON. ADRESO:  
Dro P. SÁDLO-PÁV, PRAHA 2 , KŘEMENCOVÁ 15 ELUZU LA EBLECON!

## RIDO SANIGAS.

**En Doksy.** Gasto: Sur kiuj lokoj en ĉi tiu regiono oni trovas la plej belajn vidaĵojn? Doks-ano: Sur la poŝtkartoj.

**En stacidoma restoracio:** Kelnero, kial mia porcio estas multe pli malgranda ol tiu de mia najbaro ĉe apuda tablo? - Ĉar via vagonaro veturas kvin minutojn pli frue!

**Antaŭdiro:** Kaj ĝis via 50-a jaraĝo vi multe suferos pro malriĉo! - Kaj poste? - Poste vi jam alkutimiĝos.



**Gramatiko.** Instruisto: Mi ludas, estas tempo estanta; mi vidis, la tempo estinta; mi iros teatron, la tempo estonta. Johano, kia tempo estas ekz.: mi atendas pli altan salajron. Johano: Tio estas tempo perdita.

## **KLAĈEMA OBSERVANTO**

Víte, že:

... s-ano Santner musel se v noci vracet oknem, protože když hledal klíč pod vraty, pes mu chtěl ukousnout ruku.

... s-ani Sl-a a Sá-o museli poslední večer přes plot, protože bytná předpokládala, že už odjeli. Čelo je v pořádku (hud. nástroj-pozn. znamení), jen oba s-ani utrpěli mírné pohmožděny. Jejich zdravotní stav nebudí obavy.

... s-anu Bartošíkovi se místo osla vrátil kůň, který byl šťastně dopraven (beze slevy) do Prahy a zvykl si už na nové prostředí. V příštím roce se plně zapojí do vyučování.

... zdravotní stav s-ana Špůra se pomalu lepší. Lze se domnívati, že jeho nervový systém vydrží i příští LKED 1958.

*VERDA VOĈO - informační oběžník Letní Koleje Esperanta při ODO v Doksech, vychází podle potřeby. Řídí a za obsah odpovídá Ant. Slanina. Náklad 200 ks.*